

## JESUO KRISTO LA UNIVERSALA REĜO

34-a ordinara dimanĉo 20-a de novembro 2016

### SINJORO, MEMORU PRI MI, KIAM VI ESTOS EN VIA REGNO

El la evangelio laŭ Luko 23, 35-43

Komento de p. Alberto Maggi OSM

En tiu tempo, kiam oni krucumis Jesuon, la popolo staris kaj rigardis, la regantoj de la popolo mokis Jesuon kaj diris: „Li savis aliajn; nun Li savu sin mem, se Li estas vere la Meso, la elektito de Dio!“. Ankaŭ la soldatoj primokis Lin; ili alproksimiĝis al Li kaj prezentis al Li vinagron, dirante: „Se vi vere estas la reĝo de la Judoj, savu Vin mem!“. Super la kapo de Jesuo ili pendigis skribaĵon kun la vortoj: „Ĉi tiu estas la reĝo de la Judoj.“

Kaj unu el la pendigitaj krimuloj insultis Lin dirante: „Ĉu Vi ne estas la Meso? Savu Vin mem kaj nin!“. Sed la alia intervenis riproĉante lin, kaj diris: „Ĉu vi ne timas Dion, dum vi troviĝas en la sama kondamno? Ni ricevis juste punon pro niaj faroj; sed Li faris nenion malbonan.“ Poste li aldonis: „Jesuo, memoru pri Mi, kiam Vi estos en via regno.“ Jesuo respondis al li: „Vere Mi diras al vi: hodiaŭ vi estos kun Mi en Paradizo.“

La epizodo de la tentoj en la dezerto finiĝis per jenaj vortoj: “la diablo foriris de li [Jesuo] por difinita tempo”; kaj jen tiu difinita momento: la momento de plej granda malforteco de Jesuo. Jesuo estas krucumita, jam agonianta, sur la kruco, kaj en la momento de plej granda malforteco denove prezentiĝas la tentoj pri forto, la tentoj pri povo.

Ni legu kion skribas al ni la evangeliisto Luko ĉe ĉap. 23 en versikloj 35-43; Jesuo kiu havis kiel ununuran taskon la alporton de vivo, la savon de la homoj, jam eldiris la vortojn adresitajn al la Patro, iun preĝon de pardono: *Patro pardonu ilin, ĉar ili ne scias, kion ili faras*; kaj, skribas la evangeliisto: *la popolo staris, rigardanta*.

Ĉi tiu popolo kiu sekvis lin, ĉi tiuj homamasoj kiuj estis ravitaj de lia mesaĝo, nun estas submetiĝintaj al la decidoj de la regantoj, alprenas neniun iniciaton, staras rigardante.

Kontraŭe, *La regantoj mokis lin*; jen, sen ereto da humaneco, sen ioma kompato. Finfine Jesuo, kvankam antaŭ iliaj okuloj estas kulpulo, estas homo agonianta sur la kruco, ĉi tiu terura turmentilo, nu, ili estas senkompataj, lin mokas dirante: *li savis aliajn*, kaj jen eĥo de tio kion Jesuo diris en la epizodo de la Sinagogo de Nazareto, kiam li diris: *kuracisto, sanigu vin mem: li savis aliajn, nun Li savu sin mem, se Li estas vere la Mesio, la elektito de Dio!* jen revenas la tentoj.

Ĉi tiu esprimo: *se Li estas la Mesio, la elektito de Dio*, revenos trifoje, kaj ni scias, le la nombro tri en la hebrea nombra simbolaro signifas tion kio estas kompleta, do la diablo revenas kun forto, per sia tentoj, en la momento de plej granda malforteco de Jesuo. Do la regantoj lin mokas, havas nenian kompaton kaj diras, ke se li savis aliajn li klopodu savi sin mem, se li estas la Mesio, la elektito de Dio. La elektito kiu estas forlasita. Unu el la pruvoj ke Jesuo ne estis la Mesio, la Kristo de Izraelo, estas jeno, ke la Mesio ne povis morti.

*Ankaŭ la soldatoj*, temas pri la romaj soldatoj, *primokis lin*, laŭvorte "*priŝercis lin*", kvazaŭ malserioze, *alproksimiĝis al Li kaj prezentis al Li vinagron*. Dum vino estas bildo de la amo, ĝia malo, vinagro, estas bildo de la malamo. Iu psalmo, psalmo 69 versiklo 21, diras: "en mia soifo ili trinkigis al mi vinagron", kaj diris "*Se vi vere estas la reĝo de la Judoj*, jen denove tiu tento, *savu Vin mem*".

Sed Jesuo venis por savi la perdiĝintojn, Jesuo ne venis por savi sin mem, sed por savi la aliajn, kaj la evangeliisto komentas: "super la kapo de Jesuo ili pendigis skribaĵon kun la vortoj: „Ĉi tiu estas la reĝo de la Judoj“, laŭvorte "*La Reĝo de la judoj estas ĉi tiu*". Ĝi estas tre moka skribaĵo, kaj ĝi estas la ununura konata skribaĵo pri Jesuo dum lia vivo, por primoki lin. *Ĉi tiu estas la reĝo de la Judoj*, do, estas esprimo kiu montras la plej grandan malŝaton, al ĉi tiu popolo subigita de la romanoj; sed jen tio, kion la evangeliisto celas: "*Unu el la krimuloj* la kruco estis turmentilo rezervita al la fiularo de la socio, al la plej sovaĝaj krimuloj, do esti pendigita al kruco signifis ke oni faris teruran malbonagon "*Unu el la krimuloj pendigitaj* (kompreneble, al la kruco) *insultis Lin*: „*Ĉu Vi ne estas la Mesio? Savu Vin mem!*". Jen por la tria fojo la tento "*savu vin mem*": ĝi estas la tento de la diablo, utiligi la povon por si mem.

Sed Jesuo la forton de sia amo utiligas ne por si mem sed por la aliaj. "*Savu vin mem kaj nin, sed la alia intervenis riproĉante lin, kaj diris*: „*Ĉu vi ne timas Dion, dum vi troviĝas en la sama kondamno? Ni ricevis juste punon pro niaj faroj*; do ĉi tiu krucumito kun Jesuo estas krimulo, rabisto. "*Sed li faris nenion malbonan*. Jen, ĉi tiu rabisto, ĉi tiu krimulo krucumita kun Jesuo, rekonas la realon de Jesuo, tiun realon kiu en la Agoj de la Apostoloj elstaras en la vortoj de Petro: "*Jesuo la Nazaretano, kiu ĉirkaŭiris, bonfarante kaj sanigante ĉiujn premegatajn de la diablo, ĉar Dio estis kun li*".

Do ĉi tiu krimulo rekonas ke Jesuo estas senkulpa, kaj sin adresas al Jesuo kaj petas de li: "*Jesuo memoru*" ĉi tiu verbo *memori* estas parto de la lingvaĵo de la hebrea preĝo, *memori* signifas peti de Dio ke Li alrigardu bonkore, ke Li intervenu favore al la preĝanto, do ĝi estas peto; "*Jesuo, memoru pri Mi, kiam Vi estos en via regno*", tio estas: *kiam vi venos kiel Reĝo, memoru pri mi*.

Nu, la respondo de Jesuo embaras ĉiujn, embaras la tiutempajn aŭskultantojn kaj legantojn, kaj embaras ankaŭ nin, ĉar mi ripetas: la afero ne estas tia, kia ĝi estis mildigita de la posta historio en la epizodon de "la bona rabisto". Ĉi tiu estas rabisto, krimulo, kiu – kiel li mem diras – meritis ĉi tiun teruran punon. Nu la respondo de Jesuo: "*Vere, do solena aserto*" "*Vere Mi diras al vi: hodiaŭ vi estos kun Mi en Paradizo*". Dum la rabisto estis petinta "*memoru*" *kiam vi estos en via Regno*, do ne tuj, la respondo de Jesuo estas senprokrasta: hodiaŭ mem, do ne morgaŭe, post kelka tempo, sed hodiaŭ mem, tuj, vi estos kun mi en paradizo. Estas la ununura fojo, en la evangelio de Luko, kiam aperas la termino paradizo, Jesuo, kiam li devas paroli pri la vivo kiu daŭras preter la morto, parolas pri vivo eterna, nedetruibla, sed neniam uzas ĉi tiun terminon paradizo. Paradizo estas persa termino, kiu signifas simple "ĝardeno", ĝi estis tiu interduma loko, kie la animoj estadis atendente la resurekton.

Kial Jesuo parolas ĝuste pri paradizo? La evangeliisto volas kontraŭmeti la agon de Jesuo al tiu priskribita en la libro Genezo. En la libro Genezo Dio forpelas el al paradizo la pekintan homon; kun Jesuo la unua kiu eniras kun li en la paradizon estas ĝuste la pekinta homo. Tio, kion la evangeliisto intencas diri, estas la gvidanta fadeno de lia tuta evangelio, la amo de Dio ne estas adresata al la homoj pro iliaj meritoj, sed laŭ iliaj bezonoj.

***Kian meriton havas ĉi tiu rabisto, por eniri en la paradizon? Li havas neniun meriton, sed li bezonas ĝin, la amo de Dio rigardas la bezonojn de la homoj. Por Jesuo, por la forto de lia amo, ne ekzistas neoblaj kazoj, kiujn la amo de Dio aŭ la amo de Jesuo ne povas venki.***